

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Jan. 1946

34 årg. N:r 1

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

NOVJARSALUTO

de la federacia prezidanto.

En tiu ĉi numero de nia gazeto, la unua de la jaro 1946, mi deziras per kelkaj vortoj danki vin por la pasinta jaro.

Unue mi turnas min al la ceteraj estraranoj de SEF. La kunlaboro ŝajnas al mi perfekta. Montrigis, ke la eksperimento elekti en la federacian estraron ankaŭ ekster-stockholmanojn, estis plensukcesa. Kiom kontribuis s-roj Jan Strönne kaj Lennart Åberg ne nur rilate al ideoj sed ankaŭ al teknikaj laboroj! Kaj pri la laboro de la federacia sekretario Sune Ahlm kaj la kasisto Bengt Skantz mi volas doni la plej grandan laŭdon. En la nomo de la federacio mi do sincere dankas al ili kaj deziras al ili por la nova jaro energion kaj sanon por daŭrigi siajn gravajn laborojn!

Kun la paco venis novaj eblecoj por la esperanto-laboro. La SEF-estraro dissendis al la aliĝintaj kluboj multajn proponojn efektivigotajn. Ni postulis de vi grandan oferon de tempo kaj sindono por antaŭ enpuŝi nian movadon. Mi devas diri, ke ĝenerale vi ĉiuj bone agis kaj bone sukcesis plenumi la projektojn proponitajn. Por tio vi meritas dankon!

Kaj kiam mi nun direktas al vi deziron pri ĉio bona por 1946, mi esperas, ke vi ankaŭ dum tiu jaro faros vian plejblon por nia movado ĉiu en sia loko! Samtempe mi petas vin: interrilatu ofte kun la federacia estraro, faru viajn proponojn kaj rimarkojn, kaj nepre sendu raportojn pri ĉiuj esperanto-kursoj, ankaŭ pri infan-kursoj. Tiu raportado estas plej grava, ĉar nur tiel ni ekscios, ĉu niaj propagandametodoj estas taŭgaj. Bonvolu do raporti pri ĉiu kurso, eĉ la plej malgranda, prefere antaŭ 1 februaro.

Por la nova jaro la estraro de SEF kaj ankaŭ IEL preparas kelkajn novajn aferojn. Ankoraŭ tamen estas tro frue malkovri ion, ĉar la estraro kunsidos nur meze de januaro, kiam vi espereble jam havos

LA VOJ ELEKTITA.

Je la Karlskoga kongreso 1944 la Sveda Esperanto Federacio decidis fondi specialan membrecon "La garantiantoj" t. e. membroj, kiuj promesas pagi pli altan kotizon ol la ordinaran por garantii la normalan laboron de la federacio ankaŭ dum ondoval-periodoj.

Je la Stockholma kongreso 1945 la Federacio decidis fondi alian subtenantan organizon "La Amikaro de Esperanto" samtempe ke oni donis al la garantiantoj specialan taskon. Ek de julio 1945 la garantia kotizo (fiksita je minimume 60 kr. ĉiujare) estas dediĉita por la centra laboro de la estraro de SEF, speciale por subteno de la infankursoj en lernejoj kaj por la Koresponda Centro.

Kiu estas do la signifo de tiuj du decidoj?

— Ni volas elteni kaj travivi la krizon. — Eble tio estis la penso sub la decido en Karlskoga, sed tio ne estis la bazo por la stockholma decido. En Stockholm oni estis sub la optimismo de mirinda majo de 1945 kaj oni planis por hela estonteco plena de laboro. — Tamen oni ne nur konfirmis la decidon de Karlskoga, oni pluen konstruis sur ĝia bazo, laŭ ĝia ideo. —

— Parte, sed kun aldono de io tute nova. Oni akceptis la fakton, ke la kluboj estas kaj dum longaj tempoj estos tro malfortaj por doni ekonomian bazon al la federacia laboro. Oni ne volis ŝanĝi la plej etan punkteton en la kluba memstaro, en la kluba planado aŭ la kluba laboro, sed oni serĉis garantion ke la plej grava laboro de la federacio eĉ momenton ne haltu.

— Kio do estas la plej grava laboro de la federacio?

— Sen hezito: fari novajn esperantistojn — Certe.

en viaj manoj tiun ĉi gazeton. En ĉiu okazo tiu ĉi jaro certe prezentos al vi multajn eblecojn labori por nia afero. Kaj ni certe faros multajn paŝojn pli proksimen al nia celo:

Esperanto — la rekonita internacia lingvo.

Bonan novan jaron!

E. Malmgren.

Sed tio ankaŭ estas la plej grava laboro de la kluboj. — Jes, sed la kluba celo plejparte estas: fari novajn membrojn. Bona celo, bona kaj necesa laboro, sed laboro nur por la plej proksima tago. La federacio siavice havas la taskon plenigi la mondon per esperantistoj, inter kiuj la kluboj povos kapti siajn novajn membrojn. La federacia metodo estu esperantigi la junularon. Spertaj kaj kuraĝaj membroj trovis la vojon — almenaŭ unu vojon — kaj tiu estas: esperanto en la popollernejoj. Per ĉiu rimedo la federacio devas subteni tiun laboron kaj instigi al samspeca ĉie, kie la plej eta ebleco montras sin. — La infankursoj estas bonaj, amuzaj kaj esperdonaj, sed la junuloj malaperas baldaŭ kiel metiistoj aŭ studentoj aliloken, kaj kio tiam restas por esperanto? Kaj kiom multe de la lingvo ĉe la junulo mem?

— Tiun gravan demandon la stockholma decido ne forgesis, kaj pro tio oni fondis la federacian sekcion "Koresponda Centro".

— Pardonu min, sed mi ne klare vidas ties signifon tiurilate.

— Por kio oni lernas esperanton? Por uzi ĝin trans lingvolimoj, ĉu ne? Trans lingvolimoj oni venas per legado, per korespondado, per vojaĝo kaj per renkonto kun eksterlandano. La du lastaj metodoj postulas specialan organizon aŭ feliĉan hazardon. Ni povas forlasi ilin por hodiaŭ. Ambaŭ estas ankaŭ dum normalaj tempoj ne ĉiutagaj aferoj. La legado estas grava vojo al fremdaj homoj kaj kulturoj, vojo por plenkreskuloj. Por la junularo restas la korespondado kiel ĉefa metodo por veni trans la lingvolimoj. La "Koresponda Centro" estu ilia helpilo. Se juna lernanto estos korespondanto, li havos la plej bonan instigon perfektigi sin lingve kaj resti esperantisto. Post kelkaj jaroj tamen aliaj pli proksimaj interesoj kaptos lin kaj li forlasos esperanton.

— Do la tuta laboro estis vana.

— Eble se li forlasas ĝin tro frue, sed tion oni kredas eviti kiam oni helpas lin esti korespondanto. Post kvin ĝis dek jaroj oni povas lin rekapti al esperanto. Tiam oni ne turnos sin al junuloj dudekjaraj nesciantaj ion pri esperanto. Oni turnos sin al homo, kiu certe havas nur gajajn memorojn pri interesa studado dum infanjaroj. Facile niaj tiamaj varbantoj rekaptos lin, almenaŭ pli facile ol ni nun kaptas la hodiaŭajn nesciantojn.

— Ĉu la kluboj ne povas kapti tiujn junulojn, kiuj restas en sia hejmurbo, pere de skoltaj aŭ sportaj organizoj gvidataj de esperantistoj aŭ esperantoamikoj?

— Ĉiu songas pri tiaj idealaj cirkonstancoj kaj esperas ke ili venos. La federacia laboro certe ne malhelpas klubon, kiu havas eblecojn labori je tiu direkto. Sed . . . studu la kasistan raporton en la lasta numero de *Espero*, kaj diru al vi kie estas la klubo, al kiu vi hodiaŭ povas meti vian esperon. La stockholma kongreso vidis tre klare la malfortecon de la kluboj kaj donis al la federacia estraro la garantiantajn kotizojn por ebligi la dufroktan laboron por la estonto: Subteno de infankursoj kaj farado de korespondantoj el ties lernantoj.

La Koresponda Centro estas malferma por ĉiu, kiu serĉas ĝin, sed rilate al la lernantoj de la klubaj kursoj la Koresponda Centro devas havi alian taskon, nome

Sverige — Uddevalla.

För första gången efter krigets år kan Sveriges esperantister ställa färdens i västerled och göra ett strandhugg på Västkusten. Uddevalla, den vackra idyllen vid Byfjordens strand, är redo att ta emot Esperanto-förbundets kongress under pingsthelgen 1946. Det är första gången, som Förbundets medlemmar samlas till rådslag i vår stad, och det är klart, att vi med glädje och förväntan sätter igång förberedelserna. Vi väntar, att meningsfränder från hela vårt land och grannländerna reservera pingsthelgen för en angenäm och givande samvaro i Bohusläns huvudstad.

Västkusten har ju sin dragningskraft, och den har en underlig förmåga att ta sina gäster med hull och hår. Uddevalla kan bjuda på strålende västkustsol, klippor, sand och skärgårdsfröjd, och kongressen äger rum i föreningen Nordens vackert belägna och trivsamma "Bohusgården", där en del av gästerna få bo, och där vi intaga våra gemensamma måltider, där vi kan dryfta våra angelägenheter och samlas till festlig samvaro.

I ett kommande nummer av tidningen ska jag ge en närmare beskrivning av årets kongressstad, och ni ska också på annat sätt bli påmind om, var ni bör tillbringa pingsten. Jag nöjer mig med att rikta ett innerligt och hjärtevarmt välkommen till er alla. Ni kan vara förvissade om, att vi ska göra allt, för att 1946 års förbundskongress ska bli ett glatt och strålende minne.

Einar Dahl.

Debato pri Esperanto kaj La Angla Lingvo kiel Mondlingvoj.

La angla-sveda asocio de Linköping havas debatan klubon ĉe kiu nur la angla lingvo estas uzata. La 6-an de decembro 1945 oni debatis la sekvan proponon,

"that in the opinion of this club the modern world is badly in need of a universally accepted international language such as Esperanto".

(ke laŭ la opinio de ĉi tiu klubo la moderna mondo forte bezonas universale akceptitan internacian lingvon kiel Esperanto.)

La propono estis farita de samideanoj Fred Turner kaj Dora Andersson, kaj kontraŭ ĝi parolis Tom Söderberg kaj Hans Bagger.

Post interesa kaj vigla diskutado, ĉe kiu ĉiuj montris intereson pri la neceso de mondlingvo kaj la du proponantoj iomete babilis Esperante, oni voĉdonis. La unua voĉdono estis pri la neceso de mondlingvo, kiu ajn, kaj pri tio havis ĉiuj la saman opinion, ke la mondo forte bezonas internacian lingvon. Poste oni voĉdonis pri kiu lingvo estus la plej taŭga, la angla aŭ artefarita neŭtrala lingvo kiel Esperanto. Montriĝis ke ok (8) preferus la duan alternativon kaj naŭ (9) la anglan lingvon.

Dum la diskutado kaj la voĉdonado mi ricevis la impreson ke nun estas tre oportuna tempo por Esperanta propagando kaj ke estas nur la malscio de la homoj pri la faktoj de la mondlingva problemo kiu malhelpas la progreson de nia movado.

Fred Turner.

mem esplori, ĉu ĉiu lernanto havas korespondanton kaj, se ne, havigi tian al li. Se necese oni devas doni monhelpon por afranko de la leteroj.

Rilate al la infankursoj la federacia laboro devas esti esplora, por ke neniu ebleco aranĝi tian kurson estu perdita. Ekonomia subteno, administracia helpado estu donata.

Ĉu por tiuj taskoj mankas mono kaj homaj fortoj? Se manko estas, la nova jaro donu ĉion bezonatan por ke ni povu daŭrigi sur la vojo elektita.

FRENEZO.

Dum la lasta mondmilito oni tiel ofte legis pri teruraĵo, pri la krueleco de la milito kaj ĝiaj senkulpaj viktimoj, kaj gazetoj liveris unu sensacian bildon post la alia. Tio kun la fakto ke ni ĉi tie en Svedujo vivis komforte kaj tute ekster la teruraĵoj de la milito k. pro tio ke ni neniam mem per propraj okuloj devis vidi ĉiujn suferojn kaj ĉiun mizeron, indiferentigis nin en tioma grado ke ni ne plu reakciis al bildo aŭ al sciigo pri kruelaĵoj diversospescaj, ni nur konstatis kaj registris, ni ne plu kapablis senti kompaton, ne plu povis senti emociion, kortuŝon.

Estas tamen du bildoj, kiuj tiel enkorodiĝis en mian memoron kaj min tuŝis tiel ke mi ilin neniam povos forgesi. Unu estis la bildo de japana patrino, kiu mamnutris dumonatan infanon, kaj la korpo de l' infaneto estis tute kovrita per teruraj brulvundoj kaŭzitaj de unu el tiuj teruregaj atombomboj uzataj en la finfazo de la japana milito. La dua bildo estis la bildo de germana patrino, kiu forbombita kaj senhejma kun la vizaĝo kaŝita en siaj manoj kaŭris apud la ruinaĵoj de sia hejmo en Berlina strato, kaj ĉe ŝia flanko kvar- aŭ kvinjara knabo, direktante la rigardon rekte en la fokuson de la kamero. La rigardo de tiu knabo kaj la tuta mieno de lia vizaĝo estis fortimigaj. La bildo subite igis min pensi pri la estonteco, pri la revenĝaj sentoj, kiuj jam respeguliĝis en la vizaĝoj de la infanoj en la hodiaŭa batita Germanujo.

Dum la daŭro de la milito oni ripete indigniĝis pri la taktiko de la Germanoj, pri la falsa mondkoncepto de la Naciismo, kiu permesis hebrepogromojn, kaj al kiu potenco estis justeco; oni sentis abomenon antaŭ tia doktrino kaj ĝiaj apostoloj. Same kun la japanoj, la perfidaj oblikve rigardantaj flavuloj, kiuj torturis siajn kaptitojn kaj minacis disvastiĝi super ĉiam pligrandiĝantan teritorion.

Oni tien kaj reen cerbumis provante eble konfesi, ke la popolo generale neniam kulpis pri la milito, tamen estis tre malfacile senti iun ajn simpatian aŭ kungermanoj aŭ kun japanoj.

Sed en tiu momento, kiam mi staris tie, rigardante tiujn bildojn pri tiuj kompatindaj infanoj, viktimoj de l' krueleco de la milito, en tiu momento fariĝis klara al mi la absurdeco en tiu ĝeneraligo. Tiuj kompatindaj infanoj, kioman kulpon ili havis al la milito? Neniun, absolute neniun. Tial estis ankaŭ time terura la sento, kiu trakuris min, la penso ke tiuj kompatinduletoj devas tiel suferi, kaj tute senkulpe kaj senmeritite. Mi ne sentis antipation kontraŭ ĉi tiuj infanoj, aŭ kontraŭ aliaj germanaj aŭ japanaj infanoj, anstataŭe mi sentis eĝan kompaton kun ili. Kial la vivo estu tiel kruela?

Kiam mi rigardas mian propran infaneton, malgrandan filineton dekokmonatan, mi ofte ekpensas pri tiuj aroj da senkulpaj kreitaĵoj, nun suferantaj aŭ suferintaj ĝismorte dum la pasintaj jaroj de teruro, kaj mi povas nur senti senliman dankemon al la Providenco, kiu indulgis kaj protektis mian propran infanon kontraŭ tio. Kiam oni rimarkas kiel la infanoj bezonas la amon kaj zorgon de siaj gepatroj, kiel terura estas tiam la penso pri ĉiuj kompatindaj infanoj, kiuj devas suferi, de kiuj oni forrabis patrinon kaj patron, hejmon kaj ĉion. Kaj oni demandas sin senkomprene: Pro kio — por kio?

Algot Hellbom.

Vizito ĉe s-ino Wanda Zamenhof.

Malgranda agrabla vilao en fino de ĉefurbo, sed kiam mi eniras internen, estas videblaj la signoj de milito: difektitaj muroj, senvitraj fenestroj. De sia kuracista kabineto renkontas min s-ino Zamenhof.

— Mi havas al vi peton — ŝi komencas — bonvolu korekti vian informon rilate la sorton de miaj bofratinoj, Lidia kaj Zofia. Mi havas nenian sciigon pri ilia sorto post ilia forveturigo el ghetto, sed mi firme kredas, ke ili vivas. Mi kun mia filo mirakle saviĝis dank' al helpo de kuracistoj, kiuj havis rajton eniri ghetton. Entute, la poloj, loĝintaj post la muroj de ghetto multe helpis al ni dum kaj post forlaso de tiu

Rakonto pri vojaĝo en okupitaj landoj

prezentita al la Grupo Esperantista de Stockholm en decembro 1945 de Ella Nilson.

Ni, loĝantoj en plej suda Svedlando ja povas esti tre feliĉaj, ĉar ni ja havas du ĉefurbojn. La dua estas Kopenhago, sed por multaj ĝi eble estas la unua. Mi tre ĝojis tiun belan oktobran tagon, kiam mi flugis trans la bluan Sundon por viziti tiun ĉarman urbon, kiun mi de ses longaj jaroj ne havis okazon revidi. "Kia ĝi aspektos?" mi pensis "Kiaj estas la cirkonstancoj tie? Ĉu la afabla rideto malaperis de sur la danaj vizaĝoj?"

Sciante, ke mankas diversaj varoj en Danlando, mi kunportis la duoblan kvanton permesitan. Sed neniun danĝeron, ĉar la doganistoj en Bulltofta rigardis nur per unu okulo kaj en Kastrup oni fermis ambaŭ. Mi nur pentas, ke mi ne kunportis ankoraŭ pli.

Kastrup vere internacie aspektis kun la multaj anglaj kaj amerikaj oficistoj kaj militistoj. Tiajn oni cetere trovis ĉie en la urbo. Kaj anglaj aŭtoj kaj amerikanaj jeeps plivigliĝis la stratan trafikon. Sur ĉiuj placoj kaj ĉe ĉiuj preĝejoj kaj famaj konstruaĵoj sin trovas fortikaj arangoj, kiuj memorigas pri la okupada tempo pasinta. Sed je la unua vido oni ne multe rimarkas pri difektoj kaŭzitaj de bombardado kaj sabotado. Sed, kiel estas konate, de diversaj konstruaĵoj ja restas nur rubo kaj ruinoj, ekz. la Tuborg-fabrikoj, la Shell-domo, Tivoli, Wiwex, la Langelinie paviliono, La Apollo teatro ktp. La franca lernejo ja estas tute detruita. Sur la loko staris, kiam mi vizitis ĝin, giganta kruco el kverkfolioj memoriganta pri la terura katastrofo. Tuta strato tuj apude ankaŭ detruigis.


Promenante, oni kelkfoje trovas sur trotuaro florbukedojn, kiuj markas tiun lokon, kie mortfalis iu dana heroo. Tre impresas vizito en la granda Bispebjerg-tombejo, kie multaj danaj oficiroj kaj soldatoj estas entombigitaj, same kiel tiuj policistoj, kiuj mortis en germajaj kaptitejoj. Ankaŭ granda nombro da anglaj soldatoj, konataj kaj nekonataj tie trovis al lastan ripozejon. Antaŭe ankaŭ la germanoj entombigis siajn mortintojn tie, sed iun nokton ili subite komencis elfosi la kadavrojn por transporti ilin al alia malproksima loko. Ĉar ili kolorigis trovante ĉiam freŝajn florojn sur la anglaj tomboj sed sur la germanaj neniujn. En la tiel nomata "Memora arbareto" en Hellerup, antaŭurbo de Kopenhago, oni en aŭgusto entombigis cent sep danajn liberecajn batalantojn, kiuj iumatene estis transportitaj tien kaj mortpafitaj. Iliaj tomboj aspektis kiel maro el floroj en la danaj koloroj, rozoj, dalioj, diantoj.

Multe suferis la danoj, multaj estas la postmilitaj problemoj. Unu el ili estas la vesta demando. Kvankam en fino de oktobro mi vidis multajn daninojn sen ŝtrumpoj. Ne strange, ĉar oni ricevas nur du parojn da silkaj ŝtrumpoj poĵare kaj la kvalito estas tre malbona, la flikfadenoj tre disŝirigemaj. Ŝtofo ne troviĝas en la butikoj. Tiuj malmultaj vestaĵoj, kiuj estas aĉetablaj, vendiĝas por fantaziaj prezoj. La cigaredoj estas malbonaj, la alumetoj facile rompiĝas. Sed la nutraĵa situacio estas bona, la danoj neniam malsatis. Estas superfluo de viando kaj ovoj, la kukoj kaj tortoj estas delikataj, sed la porcioj de sukero kaj butero ne estas grandaj. Ĉokolado, kakao, kafo kaj teo ne ekzistas, nur surogato. Do oni komprenas la ĝojon de mia juna konatulino, kiu, ne gustuminte ĉokoladon de kvar jaroj, ricevis kelkajn tabuletojn ĉokoladajn. Ŝi enbuŝigis pecon, fermis la okulojn, dirante: "Silentu, silentu, mi volas ĝui."

(Daurigo.)

malliberejo. Ni havis multajn signojn de simpatio flanke de alilandaj esp-istoj, precipe svedaj, kiuj per sveda ambasadorejo en Varsovio eĉ provis savi nin en 1940, kaj poste sendis al ni manĝpakaĵojn, same kiel dir. Jakob el Genevo kaj samideanoj el Portugalujo. Bonvolu saluti samideanaron de la tuta mondo, finas s-ino Zamenhof.

El Bult. esp. Pollanda.



Memoro pri Budapeŝto - iam ...

Songas la river kaj en ĝi milde ondas
tago alvenonta, tempo jam lasita.
Flugas for la viv, surborde iuj kuras
al renkont subita.

F. S z i l á g y i.

PRINTEMPO De ALGOT HELLBOM.

Vintro pasis, neĝ' degelis,
la malvarmo estas for,
ĉar la suno ĝin dispelis,
teron vestas verd kolor!
Sorĉe la arbar' susuras,
kaj ridetas anemon',
gaje riveret' murmuras
en alloga kluka ton'.

Ripozinte viv' revenas,
sin malfermas la natur,
la ĉielo nun alprenas
la koloron de lazur'.
En la blua, vasta maro,
orumita per sunbril',
banas sin la insularo
en vespera venttrankvil'.

Esperanto en Radio.

En la suba tabelo la horoj, se ne alie indikitaj, estas laŭ la Mez-Eŭropa horsistemo.

Subtenu la Esperantajn dissendojn. Diskonigu ilin inter via amikaro kaj skribu dankleterojn al la donitaj adresoj, ĉiam kiam vi ricevas kontakton.

Dimanĉo (?) Lille (Francujo). Detaloj mankas.

Lundo 22.20—22.30 Praha 1 (Ĉeĥoslovakujo) 1571 kaj 269.5. Informoj politikaj, kulturaj, ekonomiaj. Radio, Stalin-str. 12, Praha XII. 23.00—23.15 Praha 1 (Ĉeĥoslovakujo) 1571 kaj 31.41 m. Informoj kiel supre. 23.00—(?) Lyon (Francujo). Kurso. Pluaj detaloj mankas. 23.00—23.15 Varsovio (Polujo). 49.06 m. Informoj. Pola Radio. Koszykowa 8, Varsovio.

Mardo 22.20—22.30 Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo) 325.4 m. Informoj kiel supre. Radio Moravska Ostrava. 23.00—23.15 Praha 1. 1571 kaj 31.41 m. (kiel je lundo). Merkredo 18.00 (orienta tempo). Sofio (Bulgario). 352 m. Parolado. 23.00—23.15 Praha 1. 1571 kaj 31.41 m. (kiel je lundo).

Ĵaŭdo 22.20—22.30 Praha 1. 1571 kaj 269.5 m. (kiel je lundo). 23.00—23.15 Praha 1. 1571 kaj 31.41 m. (kiel je lundo).

Vendredo 15.45 (?) WRJN Racine (Wisconsin Usono). Parolado, muziko, kurso. S-ro S. Klukowski, 3233 S. Springfield Ave., Milwaukee 7. Wis., Usono. Pluaj detaloj mankas. 21.30—21.45 B.N.R.O. Kortrijk (Belgujo) 202.3 m. Parolado. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, Kortrijk. 23.00—23.15 Praha 1. 1571 kaj 31.41 m. (kiel je lundo).

Sabato 19.30—19.45 (?) (nur je la dua sabato de ĉiu monato) 3 S. R. (Aŭstralio) 238 m. novaĵoj. 20.00—20.45(?) PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro Brazilo. 23.00—23.15 Praha 1. 1571 kaj 31.41 m. (kiel je lundo).

Recevitaj gazetoj:

Svisa Espero, dec. nro/45. — Juna Vivo nov/45. — La Ligo nov./45, eldonita de laborista klubo, Kopenhago. — Laborista Esperantisto nro 7 dec./45 el Amsterdam—Renovigo, dulingva gazeto revolucia, nov./45 el Meksiko —Flandra Esperantisto el Bruselo, okt. k nov. nroj/45.

La Verda Flamo, organo de Maroka Esperanto-Asocio, nr 11/45, daŭrigas i. a. tre interesan serion pri marokaj grandurboj: Maroko, Casablanca kaj Rabat.

Esperanto Internacia, organo de IEL, finigas sian jareldonon per averto kontraŭ tia esperanta vigleco, kiu montras sin en novstarto de gazetoj kaj asocioj sen kontakto kun la jam ekzistantaj.

Cetere la numero enhavas bonajn kaj riĉajn raportojn el diversaj landoj, foje subigitaj de malamikoj. Inter aliaj artikoloj ni povas mencii unu de angla militkapitano, kiu el Palestino priskribas viziton ĉe kolektiva kolonio hebrea (KUBUCO) dividita en tri grupoj: la maljunuloj, la gelaboristoj kaj la infanoj.

Helena Esperantisto, trimonata organo de Helenaj esperantistoj, sukcesis sendi al ni siajn kajerojn por la tuta ĵus pasinta jaro. Ili prirakontas la teruran sorton de la lando sub la pesimista rubriko: Unue, triobla sinsekva malamika invado, kaj poste: eksplodo de terura anarĥismo. Cetere la kajeroj estas en greka lingvo.

Steletto Rosario, organo de esp.-klubo en Rosario, Argentino, okt. k. nov./45, raportas pri sciigoj ricevitaj el Eŭropo donantaj kaj ĝojigajn kaj malĝojigajn novaĵojn. La gazeto komencis presi esp.-hispanan vortaron kaj promesas kiel kristfestdonacon al ĉiu abonanto kalendaron esperantan por 1946.

American Esperantist, nov.—dec./45 grankar i en av sina esp.-artiklar laĝet för esperantorörelsen i Europa, en mångskiftande bild, som både skrämmer och tjuisar. Ett stort antal större artiklar på engelska utfylla häftet, som säkerligen tar skönhetspriset bland världens esperantotidningar.

Dansk Esperantoblad, dec./45 rakontas inter alie pri esperantokurso por germanaj fuĝintoj en Danlando.

Franca Esperantisto, nov. 1944—aprilo 1945, raportas detale pri la renovigo de SFPE, t. e. Société Française pour la Propagation de l'Esperanto, kaj venas en la lasta de ni ricevita numero al la fondkongresa protokolo de "Union Esperanto de France et des Colonies".

Brazila Esperantisto, som numera heter O Brasil Esperantista, kan alltjämt glädja sina läsare med underättelser om den uppskattning, som från myndigheternas sida ägnas Brasiliens esperantorörelse. Vi avtryckas på annat ställe tidningens tillkännagivande om ett nytt utkommet geografiskt verk, som i esperanto-översättning erbjudes oss på särdeles förmånliga villkor.

Bulteno esperanta pollanda, estas ĝojiga signo de nova vivo en la turmentita Pola lando. Sept. kaj nov. foliojn ni ricevis. El la lasta ni ĉerpas artikoleon pri vizito ĉe la vidvino de Adam Zamenhof, la filo de la majstro.

*

Esperanta Asocio de Rosario okazigas sian unuan postmilitan letervesperon dum Aprilo 1946. Por sukcesigi ĝin oni petas leterojn, poŝtkartojn, k.c. el ĉiuj mondpartoj. Respondo nepre garantiata. Adreso: Lorenzo 782, Rosario, Argentino.

Sinjoro J. Tellekamp. Oude Karselaan 111, Amstelveen, Nederlando, vivas kaj sendas salutojn al siaj svedaj gesamideanoj. Dum la milito li ĉiujn adresojn perdis kaj nun petas salutkartojn.

Herr Hilding Johansson, förr verksam esperantist i Falun, sedermera i Alvesta, ombedes omedelbart sätta sig i förbindelse med Gust. Johanssons Bokbinderi, Sturegatan 58, Falun.

LINGVA KOLONO.

"Batalpometoj".

Esperanto ne estas ia speco de ludilo kiun ĉiu lernanto rajtas (aŭ povas) ŝanĝi laŭ sia kaprico se li trovas tiun aŭ alian punkton ŝanĝinda. Esperanto radikigis en la esperantistan popolon kaj ni ja havas la Akademion. Sed mi estas sufiĉe aroganta kaj donas jenajn kvin proponojn:

1. La kunmeto de la literoj k kaj z estas fonetike absurda. Oni elparolas — ks — aŭ — gz —, neniam — kz —. Tial mi proponas ke oni laŭ la fakta elparolo skribu — ks — en tiaj vortoj: ekzemplo, ekzameno ktp. do: eksempro, eksameno. La risko ke oni intermiksas kun la prefikso eks- estas nur teoria, kaj oni havos la avantaĝon ke tiaj vortoj estos elparoleblaj.

2. La litero ĥ iom post iom malaperas el la lingvo kaj kredeble neniu ploras pro tio: ĥemio fariĝas kemio, ĥina fariĝas ĉina ktp. Mi proponas ke ni kunhelpu pri la entombigo de la relikvaj ĥ-vortoj kiuj ankoraŭ ekzistas. La ĥ-vortoj en Plena Vortaro tiam transiĝos al: kameleono, kaoso, kemio, ŝimero, kirurgo, kirurgio, kolero?, koruso (ĥoro), ĉoreo? La litero troviĝas ankaŭ ene de kelkaj vortoj. Kredeble ĝi povas esti tie anstataŭta per k, ekzemple monako, monarko. Anstataŭ eĥo oni plejofte povas uzi la vorton reson, sed eko certe ne estus danĝera vorto.

3. Por geografiaj landnomoj oni tre ofte uzas la formon Norvegio. Mi proponas ke oni akceptu tiun tre naturan formon apud la formon Norvegujo.

4. Mi kelkfoje aŭdis esperantistojn fieri pri tio ke ili sukcesis kompili tutan artikoleon en esperanto sen supersignoj por aperigi en gazeto kiu ne posedas la esperantotipojn. Al mi ŝajnas pli saĝe uzi la vojon montritan de Zamenhof mem kaj en tiaj kazoj uzi la literkombinojn ch, gh, (kh), jh, sh kaj u por ĉ, ĝ, (ĥ), ĵ; ĉ kaj ŭ.

5. En la Himno estas konsternanta linio kiu tekstas: "ĝi la homan tiras familion". Mi proponas ke iu aŭtoritato ŝanĝu la tekston al "tiras ĝi la homan familion". Apartigi atributon de la substantivo ŝajnas al mi tro akrobata lingvo kaj konfuzas ĉiun novan adepton kiu volas lerni la Himnon. Zamenhof pardonu al mi.

S a l e x.

EKZAMENO.

Mi ne konsentas kun Salex pri la teorio de la fonetika absurdeco de la vorto ekzameno. La sveda lingvo ne konas la "z" sonon kaj de tio dependas, ke oni preferus diri eksameno anst. ekzameno. Sed ekz. la hungara lingvo ne konas tian malfacilaĵon kaj la vorto havas efektive la saman formon en tiu lingvo. Kompreneble tio ne estas argumento pri tio, ke la ĝusta elparolo devus esti tia, sed nur pri tio, ke povas esti fonetikaj malfacilaĵoj, kiuj tamen ne estas absurdaĵoj kaj povas okazi, ke tiaj malfacilaĵoj estas problemoj nur por svedoj. Alilandanoj povas havi aliajn zorgojn, pri kiuj eble ili kredas, ke tiuj donas motivon por reformoj.

F. S.


TIPOJ KAJ ASPEKTOJ DE BRAZILO.

Originaloj el la "Brazila Revuo de Geografio" tradukitaj de sep membroj de "Brazila Ligo Esperantista". Speciala presado memoriga de la Deko Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Rio de Janeiro, de la 14a ĝis la 22a de aprilo de 1945. Eldonita de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko". Formato 27×19 Ĝi enhavas 152 paĝojn kaj 36 ilustraĵojn. Presejo de la Instituto.

Ĉiu kiu deziras ricevi ĝin bonvolu skribi al Brazila Ligo Esperantista Praça da República, 54. Rio de Janeiro, Brazilo, aldonante al sia peto tri respondkuponojn por la poŝto.

La dana monata revuo "Sol og Sundhed"

("Suno kaj Sano"), kiu laŭ informo jam pli frue okupigis pri Esperanto, nun denove, post la paco, tion faras. Legu la anoncon aliloke en tiu ĉi numero.



Stockholms esperantoförening förberedde den 5 dec. sin stora fest den 12 genom en värdefull orientering om det nuvarande läget på den esperantiska bokmarknaden, vilken vår expert boktryckare Eriksson med känd bravur lämnade oss. Festen den 12 dec. var ägnad "Boken", den internationella boken, den nationella Lucia och det trogna pionjärbetet i esperantorörelsen. Åt boken ägnades en med särskild omsorg anordnad boklåda. Luciafesten var arrangerad av klubbens ordförande, hr Håkansson, som en dramatisk entré, interfolierad av sång, där Lucias egna solopartier särskilt väckte anklang och renderade fröken Valborg Hansson långvariga och hjärtliga applåder. Aftonens höjdpunkt kom emellertid, då förbundets ordförande, hr Malmgren, äskade ljud och meddelade, att förbundet utverkat åt den avgående ordföranden Paul Nylén Patriotiska Sällskapet stora guldmedalj för långvarigt och troget arbete i Svenska Esperanto Förbundets tjänst. Vår bild visar det ögonblick, då hr Malmgren med Lucias hjälp fäster den sällsynta utmärkelsen på vår aktade pionjärs bröst.

MORTIS.

Sinjorino Denise Dupuis, edzino de la konata esperantisto kaj prelegisto s-ro Roland Dupuis, 100 rue Lafayette, Rouen, Francujo, mortis la 6:an de novembro 1945.

Svedaj geesperantistoj elkore kondolencas.

La unua spontana eldiro

pri vol. II de STELO-LIBRO-j, "La Granda Aventuro" de Ferenc Szilágyi, venis du tagojn post la apero. Ĝi tekstas inter alie:

"... Mi iam posedis libron, nomita 'Gajaj horoj'. La tempo, kiun mi uzis por tiu libro, ne estis tro gaja. Sed nun mi trovis treege gajan libron. Mi tre ridis, kiam mi legis ĝin, jes eĉ ridegis, precipe, kiam mi legis la 4 unuajn novelojn de la libro. Pro kelkaj aliaj noveloj oni ne povis ridi. Mi celas al tiuj, en kiuj vi trovis la realan vizaĝon de la milito. Ni esperas, ke tiu ĉi malgranda letero kuraĝigos vin skribi pluajn librojn..."

Literatura Klubo STELO-LIBRO ĝuis belan starton — du monatoj post la apero de vol. I (LA FINO) tiu libro estis preskaŭ elĉerpita, restas nun nur kelkdekondaj ekz., rezervitaj dum mallonga tempo por novaliĝontaj membroj. Do urĝas je tre baldaŭa aliĝo, se iu volas havi la unuan volumon. Tiuj novaliĝantoj, al kiuj ne sufiĉos la stoko de vol. I, tamen povas komenci sian membrecon de la Literatura Klubo per vol. II, "La Granda Aventuro".

Ne estas necese fariĝi membro de la klubo por havi rajton aĉeti la resp. volumojn, sed oni devas zorge atenti la sufiĉe gravajn prezajn avantaĝojn, kiujn havas la membroj. Ekz. kostas vol. II por membro nur kr. 5:75 (+ imp., afranko), dum nemembro devas pagi kr. 7:25. Petu prospekton, regularon kaj aliĝilo-mendilon.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fack 190 71

Stockholm 19

Postgiro 758

SEIF Kolono

La Kristnasko

pasis kaj baldaŭ la jaro 1945 troviĝos en la historio. Ankoraŭ ne venis al SEF la kristnaska koboldo, kiun ni invitis verŝajne iom mallerte por la Amikaro, sed ni tamen ĝojas, ĉar venis tiom multe da donacoj por niaj suferantaj geamikoj en Holando kaj Polio, ke ni fakte estis iom embarasitaj, antaŭ ol ĉio estis forsendita. Ni revenos per plena raporto en la febr. numero, sed volas jam nun danki korege al ĉiuj malavaraj donacintoj.

Novaj membroj

aliĝas ĉiutage al nia federacio kaj mia optimismo pri rekorda jaro 1946 ne ŝajnas esti troigita. Sed, dependas multe de la dormantaj kluboj. Ĉu ni povus vekti ilin dum ĉi tiu jaro? Jes, ni devas kaj krome fondi novajn. Jen labortasko por la distriktoj. — Mi tralegis

Eksterlandan gazetaron

dum la festotagoj, i. a. du jarkolektojn de Amerika Esperantisto, unu jarkolekton de Svisa Espero, danajn, norvegajn, belgajn, francajn, brazilajn kaj multajn aliajn. Kaj ĉiuj enhavas ege bonegajn raportojn pri la laboro por nia lingvo en respektivaj landoj. Sed ĉu ili povas diri la samon pri nia lando kaj gazeto? Mi ne estas tute certa pri tio. Certe multaj el niaj kluboj kaj izolaj membroj faras bonan laboron silente. Sed kial silenti? Ne nur ni en la federacia estraro interesigas pri la rezultoj de via laboro, sed ankaŭ ĉiuj aliaj devas ekscii pri ĉio, kio estas farata. Nur tiel ili povas ricevi instigon entrepreni tiajn aferojn, pri kiuj ili ĝis nun ne pensis.

Mi volas montri veran ekzemplon: En Motala oni pasintan vintron aranĝis bonsukcesan infankurson — laŭ la onidiro. Sed ĉu vi aliaj sciis tion? Preskaŭ nek ni en SEF. Statistikoj estas seka afero — sed ege necesa. Tial ni estas ege dankaj pri ĉiaspecaj raportoj, prefere detale skribitaj.

Alia ekzemplo: En Karlskoga oni ĉiujare aranĝas sukcesajn loteriojn kaj riĉigas tiamaniere la kluban kason. Kiel ili faras por atingi sukceson? Jes, verŝajne per multa laboro de fidelaj membroj, sed tamen ne sufiĉas scii tion. Ni bezonas raporton detalan pri la aranĝado por povi montri ĝin al la aliaj kluboj kaj tiel instigi ilin provi entrepreni tian aferon. — En tiu urbo ili ankaŭ ekhavis la ideon peti ekonomian subtenon de aliaj lokaj organizoj. Laŭ la onidiroj, ili sendis pet-skribojn al pli ol 100 organizoj. Pri la sukceso ni ankoraŭ nenion scias sed se ĝi ne donis monrezulton, la organizoj tamen informiĝis pri la INTERNACIA HELPLINGVO ESPERANTO kaj ke ĝi estas ege valora rimedo en la interpopola kontakto. Tamen ia gajno. Se ni nun havus detalan raporton pri tiu bonega entreprenon, ni povus sendi cirkuleron al ĉiuj kluboj instigante al ili fari la samon.

Ni volas helpi

al vi ĉiuj faciligi la laboron en la esperanta ĝardeno. Sed por povi doni tian helpon vi devas faciligi nian laboron. Elektu fidindan membron, kiu havos la taskon ellabori detalajn raportojn pri viaj entreprenoj kaj sendos ilin al ni kiam ili ankoraŭ estas aktualaj. Se ĉiuj kluboj tiel agas, ni promesas al vi verki cirkulerojn kun multe da bonaj projektoj kaj proponoj dum 1946 — la rekorda jaro.

Radio.

Ĝis nun nur 66 membroj el pli ol 1000 promesis helpi pri la konkero de la sveda radio. Ĉu vi ne ĉiuj volas aŭskulti esperantoprogramon el la sveda radio? Fakte tiuj ciferoj parolas sen komentario pri la malfacileco entrepreni ion rilate la disvastigon de esperanto pere de kluboj kaj membroj. Ni petas vin: Sendu tuj liston kun adresoj de tiuj, kiuj volas kunhelpi. Certe ĉiuj el vi povas skribi leteron!

Koresponda Centro

Ĝis nun peris 40-on da leteroj kaj kartoj de svedaj esperantistoj al eksterlandaj samideanoj. Sed ankoraŭ ni havas multe da adresoj, ekz. el Ĉeĥoslovakio pli ol 100, Nov-Zelando 30, Nederlando 15, Bulgario 30, Anglio 15, krome Francio, Sudafriko, Finnlando, Hispanio, Sudameriko, USONO, Egiptio, jes ni fakte baldaŭ povas peri leterojn al ĉiuj landoj en la mondo, Do faru nur tiel: Skribu leteron al nekonata esperantisto, metu ĝin en koverton afrankitan sen adreso kaj sendu ĉion al Koresponda Centro de Sveda Esperanto Federacio, Tegelbacken, Stockholm. Ni forsendos ĝin tuj al konvena samideano(in)o en dezirita lando. Vi ankaŭ povas sendi karton se vi volas.

Se vi faras tiel vi povas esti pli certa pri la respondo, ĉar se oni respondas laŭ anonco, la anoncinto plejofte ricevas tiom da leteroj, ke li ne povas respondi al ĉiuj. Tio okazis al svisa instruisto, kiu anoncis en nia gazeto kaj ricevis 70 leterojn, sed havis nur 25 lernantojn.

En la urbo LYNN, Usono, studas nun 13—15 jaraj gejunuloj nian lingvon kaj volas korespondi kun svedaj gejunuloj. Se niaj klubaj instruistoj volas kapti tiun okazon korespondigi siajn gelernatojn ni proponas, ke la infanoj skribu siajn leterojn, la instruisto kolektas ilin (eble ankaŭ korektas) kaj sendas ilin en sama koverto por tiel malaltigi la afrankon. La adreson mi donas ĉi tie:

Sinjoro Robert Alberg, 21 Bedford Street, LYNN, Mass., USA.

Sveda Esperanto Gazeto.

Nun kiam la paca tempo komencas reveni kun banaĵoj, oleo, senkupeka kafo, cigaredoj, ovoĵoj k. t. p., ni ankaŭ esperas ke nia gazeto denove ekhavigos sian verdan vinjeton kaj siajn 16 paĝojn. Sed ĉar tio ne rekte dependas de la malfermo de la limoj ni verŝajne mem devas ion fari. Kion? Nu, kompreneble varbi, varbadi duoble pli da abonantoj. Se nur kelkaj abonas, tio ja ne pagas la eldonkostojn, kaj tial ni ankaŭ en tiu rilato devas streĉi nian forton ĉijare. Ĉiuj certe salutos pli ampleksan gazeton kore bonevena kaj tial ni ankaŭ devas ĉiu en sia loko varbi novajn abonantojn. Memoru ke 1946 estu rekorda jaro — en ĉiuj rilatoj — kaj ke ni ne atingos tion, se ni nur esperas. Ni devas ankaŭ labori.

La Estraro de SEF

kunvenos dimanĉe la 13-an de januaro en la sekretariejo, Tegelbacken, Stockholm. Partoprenos Nylén, Malmgren, Ahlm, Skantz, Strönne, Åberg, Håkansson, Elisabet Olsson, Wästfelt, Bernh. Eriksson, ge-Julin kaj ev. aliaj konsultindaj esperantistoj.

Sam.



Meddelande från Esperanto-Institutet

Avlagda examina år 1945.

H ö g r e e x a m e n har avlagts av Ernst Karlsson i Grums och Edvin Porsbring i Karlskrona.

L ä g r e e x a m e n: Ingvar Stenström i Tingsryd, Birger Sjöberg och Bror Bergquist i Avesta, Folke Jönsson, Signe Jönsson och Yngve Lidbo i Karlskoga, Inga-Maj Adamson, Anna Hagdahl, Uno Eriksson, Torsten Birgersson, Gunnar Wester, Karl Malm och Hans Hultin i Göteborg, Tage A. Edlund och Agda Karlsson i Borås, Henrik Eriksson i Sandarne, Elin Zandrén i Valskog, Dagny Nilsson i Malmö och Bengt Jernberg i Östersund.

Institutet gratulerar!

Examina, som ej fullföljts.

Ett förhållandevis stort antal examinander har avlagt visa delar av högre examen, medan någon eller några detaljer återstår. Det är särskilt uppsatsen, som många

tveka inför. Förmodligen är det så, att vederbörande ämnar samla sig till någonting riktigt urstytvt, ett mästerverk. Men: strunt i mästerverket, för oftast blir det aldrig gjort! Skriv i stället en enkel uppsats med det samma, så är saken klar! De som känner sig träffade av dessa rader böra snarast sätta sig i förbindelse med institutet, så deras examina blir färdiga. Det är minnans intet nöje för institutet att som i år kunna rapportera endast 2 avlagda högre examina, när en hel del andra borde finnas med.

Vårens examensskrivning.

Söndagen den 17 mars äga vårens esperanto-skrivningar rum. Anmälan om deltagande göres till institutet senast den 5 mars.

"Somera Universitato" i Uddevalla 1946.

Under tiden 10—16 juni, alltså omedelbart efter pingsthelgen, ordnar institutet en studie- och semestervecka på "Bohusgården" i Uddevalla. ABF:s medverkan har utlovats. Föreläsare beräknas medverka även från grannländer.

Sommarkurs i Jursla.

Även i sommar hålles en "Esperantisternas semestervecka" i Jursla. Tiden: 14—20 juli. Huvudföreläsare blir som föregående år dr Szilagyi. Att det blir lika trevligt som det brukar vara garanterar Norrköpings Esperantoklubb.

SVEDA KRONIKO

Göteborg. La 16 decembro ABF invitis al prelego kun prof. Björn Collinder, Uppsala, kiel oratoro. Prof. C. en brila kaj konvinkiga maniero respondis kaj rebatis serion da asertoj, per kiuj la publiko ĝenerale volas kondamni esperanton. Malgraŭ iom nekonvena tago tuj antaŭ Kristnasko plena salono aŭskultis la valoran paroladon.

Karlstad. La Kleriga Konsilistaro (Bildningsrådet) ĉe la regimento I 2 decidis starti ampleksan libertempan instruadon, precipe por la rekrutoj, kaj inter la proponitaj temoj troviĝas ankaŭ esperanto. 40-hora kurso estas aranĝita de 17/9—6/12 45. Krom la militista grupo estis ankoraŭ du studrondoj esperantistaj, unu por 14 komencantoj, gvidata de Gustaf R. Johansson, kaj unu daŭriga kurso por 8 partoprenantoj sub la gvido de Hugo Byström.

Falun. Esperantoklubbens nuvarande adress är: Sturegatan 58, Falun.

Esperantoklubo de Västerås. 9/11: En longa parolado pri "När esperanto kom till Sverige" Paul Nylén kun sia elkora rakontmaniero donis bildojn pri la pionira tempo. Salex deklamis poemojn de Fröding.

14/12: Sub gvido de Bergsten la partoprenintoj de la komenca kurso faris provojn kaj estis akceptataj membroj de la klubo, kiu per tio preskaŭ duobligis. Bergsten faris rakonton pri telefonaparato. Voĉlegado el "La granda aventuro".

En 1946 la unua kunveno estos la 18 januaro kaj poste ni kunvenos ĉiun duan vendredon en Anderssons Konditori, Köpmangatan.

Kumla esperanta klubo La Estonto anoncas novan adreson: Solhemsgatan 14 C, Kumla. Dum la aŭtuno 1945 estis aranĝitaj espkursoj kun ABF, sciigis al Örebro-Kuriren la sekr. Fritz Ström.

Malmö 3.11. La vespero kiam la sinjoroj respondis por la programo, estis tre varia. Kanto de Reinh. Hansson, voĉlegado de Sture Persson kaj ŝerca demandsporto, kiu laŭ la gvidinto Wilh. Johansson, oni disaŭdigis por la tuta mondo. S-ino Ester Andrén en la nomo de la s-inoj dankis por la agrabla vespero. 7.11. Interesa prelego de f-ino Hilda Hansson pri la temo: "La teozofia movado." 21.11. Esther kaj Hildur Wallin raportis pri la feriaj kursoj esperantaj en Björkås kaj Jursla. Belaj lumbildoj sekvis la raportojn. S-ino Clary Hansson pere de belaj lumbildoj faris rondvojaĝon kun la

publiko en kanaloj de Gotenburgo per la turistboato "Paddan". La subskribinto esperas ke la vespero instigis al multaj partopreni la kursojn venontjare. 1.12. La kristnaska foiro iĝis same sukcesplena kiel dum la antaŭaj jaroj. S-ro Helge Andrén meritas specialan dankon, ĉar li tiel energie kaj bonhumore gvidis la aŭkcion. 5.12. Laborkunsido. Post la intertraktoj s-ro Jan Strönne faris interesan paroladon kun lumbildoj: "Rapida vizito en Svisujo".

H-dur.

Solvo de la krucvortenigmo en la decembra numero.

U	Z	O		N		K	I	O
J		R	E	I	R	I		M
O	K	A		H		A	M	O
	R			I		A		
M	E	D	A	L	I	O	N	O
	D			I			K	
K	I	E		S		P	O	R
A		K	O	M	B	I		E
J	E	S		O		A	R	E

Gajnintoj de la libropremioj fariĝis:

1. Fraŭlino Britta Adolfsson, Nytorgsgatan 36, Häl-singborg.

2. Sinjoro Sten Öfors, Box 62, Kvarnholmen.

Al erare solvintoj:

OBS.! la esp. adjektivoj finiĝas je — a.

Ĉu "ano" estas inklino?

"Nuraj skriberaroj" ne estas aprobataj!

Tamen ne malesperu, pli bone alifoje!

Esperantistisk grafikerinternational. Vid ett möte i Stockholm med esperantister från de grafiska yrkena har man beslutat bilda ett internationellt förbund för desa yrkesgrupper.

Till våra läsare!

Vi ha sänt med ett inbetalnigskort för prenumeration även med detta nummer, då det ännu är en hel del som ej förnyat prenumerationen. Har Ni gjort det redan, tacka vi — har Ni inte gjort det, bli vi Eder tack samma om Ni gör det nu.

LA JUNA VIVO

ligilo inter la membroj de la nun restarigita Tutmonda Junular-Organizo, denove aperas. La gazeto kaj la organizo celas organizi kaj interesigi la junularon por nia lingvo, kaj jam oni bone sukcesis: nur en Anglujo oni en la fino de 1944 atingis la respektindan membronombron de ne malpli ol 868 anoj. La junulara laboro estas vere subteninda kaj ni invitas je abono de LA JUNA VIVO, kiun ni peras, ĉar ankoraŭ ne eblas sendi monon al Nederlando.

Abonprezo: 1.50 guld. jare.

Kotizo por TJO: 1.— guld.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fako 190 71 STOCKHOLM 19 Poŝtgiro 57 8

Multaj novaĵoj ĉe la Eldonejo.

Fine oni denove havas eblon ricevi literaturon el eksterlando, kaj la Eldonejo rapidis havigi tion kio eblas. Ankoraŭ nur el kelkaj fontoj oni povas ĉerpi, sed ĉar dum la tuta milito ni soifis je literaturo eksterlandesperanta, oni devas senti sin feliĉa, ke almenaŭ parton de la antaŭmilita superfluo oni denove havas. Mallonge ni citos jene la novaĵojn (atentu, ke ĉe antaŭpago oni al la prezoj aldonu 15 % por afranko kaj imposto):

Vivo de Zamenhof. Av esperantorörelsens store vältalare Dr E d m o n d P r i v a t. Denna ypperliga bok, som intimt skildrar vår "mästares" liv och verk och som varit omöjlig att anskaffa till alla dem, som under kriget velat ha den, har nu inkommit på nytt. Illustrerad. Kartonnerad. Pris kr. 5:50.

Aeronaŭtika Terminaro.

Armea Terminaro.

Terminaro por infan-ludoj.

Muzika Terminaro.

Radio-Terminaro.

Prezo por ĉiuj kvin kr. 4:50, aparta vol. 1 kr.

Ĉu vi scias? La libreto enhavas 200 demandojn, kiuj interesas esperantistojn. Provu — la ĝustaj respondoj troviĝas en la dua parto de la libro. Ĝi igas vin pensi. Prezo kr. 1:—.

Bibeln, inbunden i klotband, gott papper. 8:—.

Nya Testamentet, inbundet i klotband. 2:—.

D:o, d:o, inb. i läderklot. Oxford India-papper med guld-snitt. 5:50.

D:o, d:o, inb. i svart mjukt läderband med helt guld-snitt, finaste Oxford-india-papper. 7:—.

Dro Dorner. Originalo en Esperanto de Dro H. L. Eger-rup. La aŭtoro, kuracisto kaj krome esperantisto de post multaj jaroj, per sia romano kreis belan kadron ĉirkaŭ la science interesa sed ĝenerale iom delikata temo: artefarita gravedigo. Kr. 6:50.

La forto de l'vero. Legolibro en formo de romano. Esp. originalo. Kr. 2:50.

La viro el Francujo. Moderna kriminala romano. 243 paĝoj. Kr. 5:—.

ŝi. Rider Haggard. Romantikaj aventuroj en nekonata Afriko. 278 p. Kr. 5:—.

Fanny. Edna Ferber. La romantika vivo de juda knabino en Usono. 240 p. Kr. 5:—.

Riĉa kaj sen mono. De la konata angla aŭtoro E. Ph. Oppenheim. Temo: Kiel riĉulo vivis dum unu jaro kiel laboristo. 224 p. Kr. 5:—.

Petrolo. Nobelpremiito Upton Sinclair. Romano pri la Usona petrolindustrio. Vol. I: 306 p. Vol. II: 320 p. Po vol. Kr. 5:—.

La aventuroj de Marteno Drake. Aventuroj de angla knabo antaŭ cent jaroj. 206 p. Kr. 5:—.

La naiveco de Pastro Brown. En kiu naiva pastro rolas kiel detektivo. 256 p. Kr. 5:—.

La vojo returne. La grandromano de Remarque pri la unua mondmilito. 370 p. Kr. 5:—.

Juneco kaj amo. Legendo el Venecio. 70 p. Kr. 0:75.

Romeo kaj Julieto. Proza traduko de la fama dramo de Shakespeare. 84 p. Kr. 2:75.

Esperanto por infanoj. Legolibro kun multaj ilustraĵoj. 69 p. Kr. 2:—.

Johano kaj Silvio. Simpla legolibro por la komencantoj. Kr. 1:25.

La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo. Charles Dickens ravige rakontas por siaj infanoj. 120 p. en luksa eldono kun multaj ilustraĵoj kaj bele bindita. Kr. 6:75.

EPOKO-libroj: serio da interesaj romanoj por distraĵhoroj:

Murdo en la Orienta ekspreso. Agatha Christie. 183 p. Kr. 2:—.

Svenska Esperanto-Tidningen**La Espero**

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet
Postadr.: Postfack 19071, Stockholm 19.

Redaktör: Eva Julin, Nytorrgsgatan 15, 4 tr. ög., Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98. Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:—. Lösnummer 0:35. Utkommer en gång i månaden.

Annonspis: 20 öre pr mm. **Korrespondensannons:** 1:50.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., post-adress: Box 19071, Stockholm 19 (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

La knaboj de Paŭlo-strato. Carma rakonto por junajmaljunaj. 180 p. Kr. 2:—.

La Princo kaj Betty. De la mondkonata angla humoristo Wodehouse. 180 p. Kr. 2:—.

La tempomaŝino. H. G. Wells. 180 p. Kr. 2:—.

Princino de Marso. 180 p. Aventuro. Kr. 2:—.

Colomba. Romano, 184 p. Kr. 2:—.

Prezo de ĉiuj libroj samtempe menditaj Kr. 10:50.

Sep Vangofrapoj. Sprita kaj interesa romano. 150 p. Kr. 3:25.

Plena Vortaro. Nia plej fidinda nuresperanta vortaro. 511 p. Kr. 15:—.

Plena Gramatiko de Esperanto. Kalocsay-Waringhien. 488 p. Kr. 8:80.

(Nur kelkaj ekz.)

Bukedo. El ĉefaj naciaj mitoj. Poezio. Kr. 3:—.

(Nur kelkaj ekz.)

Nokto en Karlův Tyn. 3-akta ĉefia komedio. Kr. 1:50.

(Nur kelkaj ekz.)

Al ĉiuj prezoj aldonu 15 % por afranko kaj imposto.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fack 190 71. Stockholm 19. Postgiro 578

Læs "Sol og Sundhed"!

Organ for den danske Solsportbevægelse. — Tidskriftet har nu igen optaget Esperanto i sine Spalter og gaar ud til mange Esperantister rundt om i Verden. Abonner paa det: 1 Kr. pr Nummer. Helaar 12.00. Fri-mærker modtages. Meget smukt illustreret.

Por korespondi kun ĉiuj landoj, interesaj objektoj alĝu al la trilingva klubo "Amikeco". Petu informojn al O. T. P. 4 str. J. C. Tissot en ST. ETIENNE — Francujo.

